

Novaĵoj de

Esperanto-USA

Dumonata bulteno • *Bimonthly bulletin* • Vol 47, Nº 2 (2008/2)

Memori Grandulon

Don HARLOW, kune kun s-ro Claude PIRON (kiu forpasis en la sama semajno), estis inter la plej klareprimaj homoj kiujn mi konis. Ili ambaŭ tute elstaris super preskaŭ ĉiu alia per sia kapablo klare kaj konvinke klarigi aferojn — interalie, aferojn pri Esperanto kaj ĝia granda utilo al la mondo kaj al la individuoj kiuj uzas ĝin.


Mi havis la privilegion intime kunlabori kun Don dum kelkaj jaroj en la oficejo de ELNA, kaj min neniam forlasis la sento ke tio ja estas privilegio. Liaj scio pri esperanta literaturo kaj kapablo elekti kaj koncize priskribi novajn librojn por vendi en la libroservo de ELNA estis por mi (kaj por ELNA) grandegaj kontribuoj. Sub lia mastrumado, la libroservo daŭre kreskis kaj pruviĝis esti fundamenta ero de la agado de ELNA. Ni plurfoje rimarkis, ke la libroservo altiris al ELNA novajn interesatojn kaj novajn membrojn.

Por povi labori por ELNA kaj por esperanto, Don elektis rezigni pri multe pli enspezaj laboroj, kaj metis sin kaj sian familion en finance malkomfortan situacion dum kelkaj jaroj. (Tio ne eblus sen la subteno de lia edzino Anjo.) Lia sindediĉo al la tuta homaro, inkluzive de sia laboro por esperanto, estis tiom altgrada, ke li eĉ malakceptis kelkajn financajn avantaĝojn kiujn ELNA kutime donis al siaj dungintoj, malgraŭ sia malkomforta financa stato.

Don elradiis amon al la homaro kaj al la naturo. Plurfoje mi ĝuis promenojn tra naturejoj gvidatajn de li, kaj ĉiam li instruis al mi ion novan pri la naturo. Eĉ dum ĉiutaga laboro en la oficejo, lia sprito ofte mirigis kaj ridigis min. Lia homamo sentebilis malantaŭ ĉiuj siaj argumentoj kaj ŝercoj. Li briligis lumeton, kiu per esperanto kaj per interreto brilis tra la tuta mondo.

Lian mankon sendube sentos longe la tutmonda esperantistaro kaj speciale tiuj kiuj konis lin persone. Mi mem dediĉis al li kelkajn larmojn.

— Joel BROZOVSKY



Esperanto-USA

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Redaktoro • *Editor*: Hoss FIROOZNA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ E-USA bulletin, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, University of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial
deadline for the upcoming issue:*

la 10-a de majo 2008

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn en aŭ Esperanto aŭ la angla. Bonvolu inkluzivi viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj la fotinto kaj la fotito(j), la loka kaj la dato. Ni ne perpoŝte resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la aŭtoro(j), kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

★★★

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subject(s), along with location and date. Materials will not be returned by mail unless you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the author(s) and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Esperanto-USA Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA
☎ 510.653.0998; 2510.653.1468
✉ info@esperanto-usa.org
http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Steven D. BREWER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: Anna BENNETT

Aliaj estraranoj • Other board members:

Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Trevor ANDREWS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, Lusi HARMON, Robert L. READ, Tim WESTOVER, Christopher ZERVIC

Karaj legantoj: kiel vi jam sendube eksciis, baldaŭ post la lasta redaktofino subite forpasis du el niaj plej bone konataj kaj amataj eminentuloj: Claude PIRON kaj Don HARLOW.

Neniaj vortoj ĉi tie sufiĉus por ĝuste honoru ilin, sed ĉi-numere ni provas almenaŭ iomete rememori tiujn elstarajn homojn kaj iliajn multajn laborojn kaj kuraĝigojn. Komprenoble ni bonvenigas vin kontribui ankaŭ viajn memorojn, omaĝojn, rakontojn ktp.

Ekde miaj unuaj paŝoj en Esperantujo, por mi la nomoj HARLOW kaj PIRON estis kvazaŭ samsignifaj kun "Esperanto" mem. Per siaj spritaj verkoj, PIRON inspiris min daŭrigi la lernadon kaj esplori la riĉan esprimopovon ene de la internacia lingvo. Samkiel multaj nuntempaj lernantoj, mi unue ekkonis la lingvon pere de la reto, sed en epoko antaŭ la apero de la nun ĉiea TTT. Kaj samkiel poste, en tia teknologia "pratempo" Don estis reta pioniro kaj fidinda ĉiĉerono por nia lingvo. Li senriproze laboris, saĝe konsilis, respondis demandojn, verkis tekstojn pri kaj en Esperanto, kaj ĝentile, saĝe traktis misinformojn.

Ambaŭ homoj multe antaŭenigis la diskonigon de nia lingvo kaj riĉigis nian komunumon. Ili restu por ĉiam en niaj koroj kaj memoroj. Eble la plej bona omaĝo estas daŭre lerni per iliaj verkoj kaj daŭrigi iliajn laborojn. ★



Hoss FIROOZNA

redaktas vian bultenon. Li *malpacience* atendas viajn kontribuojn: recenzojn, fotojn, raportojn, leterojn, plendojn... eĉ riproĉojn! (Nu, eble ne riproĉojn.)

bulteno@esperanto-usa.org

Join Esperanto-USA! Members receive: a bi-monthly newsletter • discounts at our store and our annual convention • annual *Membership List* • access to the email list *elna-membroj* • member privileges at our website • and the satisfaction of promoting Esperanto in the USA! Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

Don't allow other members to see my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

Life (*birthdate required*)..... \$800.00

Sustaining..... \$80.00

Family..... \$60.00

Individual..... \$40.00

Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00

Limited Income..... \$20.00

Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

FROM THE CENTRAL OFFICE | BY BILL HARRIS

From the Central Office



BILL HARRIS

is Director of the Central Office of Esperanto-USA in Emeryville, CA.

elna@esperanto-usa.org

The book service now includes the CD *Pronunciation for Beginners*, a re-recording of an audiocassette made by Miko SLOPER when he was the director of the C.O. The recording has been divided into two parts: part I contains basic pronunciation information, and part II contains readings from Richardson's *Learning and Using the International Language*.

The CD comes with the complete text of part I so students can follow along and read the words and phrases as Miko speaks them.

Both parts of the recording and accompanying text are available for free online at:

http://esperanto-usa.org/info/general_links.html

The CD is for those who don't want to burn their own copy.

Pronunciation is one of the facets of Esperanto education which does not get enough attention from students and teachers. This is particularly true of courses taught by enthusiastic Esperantists who are not trained foreign language teachers. For example, the material at lernu.net varies in pronunciation accuracy from excellent to poor.

One reason for this oversight is that it's difficult to put into words exactly how to pronounce certain letters and sounds; exactly what the student is doing incorrectly; and exactly what the student should do to correct his/her pronunciation. Another difficulty is that many students are self-taught, and don't know how to evaluate their pronunciation, or how to improve it.

The advent of the computer has made it possible for individual students to improve their pronunciation, but few take the time and trouble to do so. One effective method is to record yourself speaking sentences from the text referred to above, and then listen to the recording again three or four days later. If you listen critically, you will no doubt find errors.

Many free recording programs are available. For example, the open-source *Audacity* allows you to record and edit sound files on Windows, Mac OS X and Linux. See:

<http://audacity.sourceforge.net/>



The Central Office relocation is complete! Thanks to helpers Enrike ELLEMBERG, Doug LEONARD and Henry STUDER. Photos by Bill HARRIS.

Candidates chosen

The work of the 2008 Nominating Committee has been completed. Ballots and information about the candidates will be distributed in a separate mailing. The candidates:

- **For president:** Filippo DORCAS
- **For vice-president:** Steven BREWER, Tim WESTOVER
- **For the board:** Marta CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Beth MAGALLON, Leland B. ROSS

What's in a name?


Suggest a new name for the Esperanto-USA newsletter!

This past summer our organization the *Esperanto League for North America* (ELNA) became *Esperanto-USA*, taking the name previously used by the newsletter. Now we're in need of a **new** name for the newsletter, to distinguish it from the organization.

Have any good ideas? Send them to the editor ASAP! If we use your suggestion, we'll credit you in the newsletter and you'll win eternal glory, not to mention our gratitude.

Forpasoj

Donald J. HARLOW



Forlasis nin amiko, samideano, kaj unu el la plej brilaj steloj en la Esperanta ĉielo: Don HARLOW, per sia morto je 27 januaro 2008 en Martinez, Kalifornio pro komplikajoj de kancero.

Don naskiĝis la 8-an de julio, 1942 en Portland, Oregono kaj loĝis en Lake Grove, Oregono ĝis la fino de gimnazio. En 1959 li aĉetis Esperanto-lernolibron kaj studadis sole, ripetante ĉiujn vortojn ĝis li sentis sin kompetenta, sed neniam li aŭdis kiel sonas parolata Esperanto.

Dum li estis gimnaziano la lernejo sendis lin al Danujo kiel interŝanĝan studenton kaj tie li trovis Esperantan klubon. Li decidis viziti ĝin por aŭskulti kiel sonas Esperanto. S-ro ITOO Eizo el Japanio estis la parolanto tiun tagon, kaj Don, aŭskultante alilandanojn paroli Esperanton, (Japanoj kaj Danoj kaj aliaj) sentis ke li bone komprenas kiel Esperanto povas esti la monda lingvo. Tio instigis lin sekvi la Esperantan vojon.

Li revenis hejmen, finis la gimnazion kaj translokiĝis al Pasadena, apud Los-Anĝeleso, Kalifornio por studi astronomion en la universitato Kalifornia Instituto de Teknologio (CalTech). Li tuj aniĝis al la Esperanto-Klubo de Los Angeles, kie li estis unu el la entusiasmaj partoprenantoj de la grupo, kaj dum du jaroj vicprezidanto. Je la fino de la studjaro, li renkontis la virinon kiu estiĝis lia edzino Anjo. Li devis eniri la militservon kaj decidis eniri la aerarmeon. Tiun saman jaron, 1964, li diplomiĝis en junio, enmilitiĝis (en aŭgusto) kaj edziĝis (en novembro). Don tuj komencis instrui Esperanton al Anjo post la geedziĝo, kaj insistas ke "Amo estas unu el la tre plezuraj manieroj por instruado."

Don kaj Anjo translokiĝis unue al Teksaso, kie li renkontis kelkajn aliajn esperantistojn kaj kolektis subskribojn por la petskribo al UNO; poste al Charleston, Suda Karolino, kie ili tuj komencis Esperantan grupon, kaj li komencis instrui Esperanton.

Ankoraŭ en la aerarmea servo, Don kun Anjo translokiĝis al Anglujo, por dum kvin jaroj restadi tie. Loĝante tre proksime al Londono, ili aliĝis al la Londona Klubo. Tie ili konatiĝis kun elstaraj Esperantistoj kiel Ivo LAPENNA, Nikolaj RYTJKOV kaj John WELLS. Londono kaj Eŭropo estis malfermitaj por ili per Esperanto. Tie Don estiĝis dumviva membro de UEA.

Poste li refoje estis reasignita en la rezerva aerarmeo al Sakramento, Kalifornio kaj fine translokiĝis al Pinole, Kalifornio en 1972. Li aniĝis al la lokaj grupoj, ĉeestis kunvenojn kaj instruis Esperanton loke.

Don estis Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA 1979-1983, Sekretario 1984-1986, Redaktoro 1987-1995, Prezidanto de ELNA

1994-1996, Vicdirektoro 2002 kaj je la foriro de Joel BROZOVSKY en 2005 estiĝis direktoro, kiun postenon li okupis ĝis 2007, kiam lia sanstato devigis demision.

Don estis unuanime nomita Honora Membro de ELNA. Li ricevis specialan rekonon de UEA en 2007 per nomumiĝo al nova kategorio de Honora Membreco, "Diplomo pri elstara agado por Esperanto." Li estis la unua kiu ricevis tiun honoron.

Don rete enmetis multajn informojn pri Esperanto, kulturo, poezio, ktp. Laŭ la kutima ordigo de Google, lia ĉefpaĝo *Esperanto Access* estas la tria plej ofte vizitata Esperanto-paĝo en la reto, post esperanto.net kaj esperanto.org kaj antaŭ ekzemple esperanto.se kaj la ĉefpaĝo de la Esperanta Vikipedio. Liaj literaturaj paĝoj ricevas 1000-2000 vizitojn ĉiutage. Don helpis al nekalkuleblaj multoj de komencantoj per konsiloj kaj alia helpo, kaj liaj recenzoj estis ĉiam interesaj kaj trafaj.

Don verkis libron pri siaj spertoj kiel Esperantisto, *The Esperanto Book*; tradukaĵojn, originalajn verkojn, novelojn. Don dividis la Premion Deguĉi de UEA en 2003.

Tiuj, kiuj tiom profitis tra la jaroj de la bonhumoro, scio kaj scipovo kaj helpemego de Don scias, ke li estis vera modelo de homo kiu dediĉis sian vivon al Esperanto kaj Esperantistoj. Ni longe sentos lian mankon.

—William R. HARMON

Fonduso Don Harlow

Por honori kaj danki al Don HARLOW, la Estraro kreis novan fonduson, la *Fonduso Don Harlow*, por subteni kaj daŭrigi liajn retajn Esperantajn laborojn. Lia filino Sybil Harlow PETTS apartigis la Esperantajn partojn de la familia hejmpaĝaro, kaj Ed WILLIGER enmetos ilin en alian paĝaron pli facile uzeblan por Esperantistoj. Tiam eblos zorgi pri la temoj kaj eĉ aldoni novajn literaturajojn. Tim WESTOVER pretas akcepti la rolon de zorganto de tiuj paĝoj, kaj se vi volas subteni tiujn laborojn, vi povas sendi donacon al la *Fonduso Don Harlow* al la centra oficejo: Esperanto-USA, 1335 Stanford Ave. Suite 300, Emeryville CA 94608.

J. Tilman WILLIAMS

J. Tilman WILLIAMS died February 14, 2008 after a long illness. He was 82. Former mayor and city councilman of Garden Grove, California, a veteran of World War II and a graduate of Michigan State University, he was a life member of E-USA.

WILLIAMS was twice elected to the Garden Grove City Council and twice elected its mayor. "He was a dedicated man," said current Mayor Bill DALTON. "He always wanted to do what was best for the city and make it a better place."

WILLIAMS was a member of the Orange County Democratic Party and a leader of The Esperanto Organization. He promoted Esperanto as an international language, said his daughter Leslie Ann WILLIAMS. "He strongly believed that Esperanto could bring the people of the world together as one community," she said.

As a father, he was fun to be around. "He was the dad in the neighborhood that all the kids wanted to be with," she said. "They laughed even when he made up silly knock-knock jokes."

J. Tilman WILLIAMS is survived by his two daughters Marti REIS and Leslie Ann WILLIAMS, two grandchildren and two great grandchildren.

(Excerpted from the Orange County Register and the Washington Post)

Claude PIRON ne plu inter ni

Claude PIRON, Honora Membro de UEA, populara Esperanta verkisto kaj pedagogo kaj amata preleganto, forpasis la 22-an de januaro hejme en Gland, Svislando. Li naskiĝis en Namur, Belgio, en 1931.

PIRON laboris kiel tradukisto-protokolisto por Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko 1956-1961 kaj poste por la Monda Organizaĵo pri Sano i.a. en Genevo, Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969. Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakoj de la Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Poste lia ĉefa aktiveco apud psikoterapia praktikado estis profesie trejni junajn psikoterapiistojn.

Claude PIRON esperantistiĝis en 1942. Li membriĝis en Tutmonda Junular-Organizo TJO (la posta TEJO) en 1946 kaj en UEA en 1947. Ekde 1958 li estis dumviva membro de UEA. En 1958 li kunfondis Esperanto-klubon ĉe UN en Novjorko kaj fariĝis ties unua prezidanto. De aprilo 1963 ĝis majo 1966 li estis redaktoro de *Svisa Espero*. Li prelegis pri sia scienca fakoj i.a. en Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo; la kursoteksto aperis ankaŭ presite, *Kiel personeco sin strukturis?* (1978). Dum la 64-a UK en Lucerno en 1979 PIRON estis rektoro de Internacia Somera Universitato. Membro de la Akademio de Esperanto li estis de 1979 ĝis 1988.

Jam frue PIRON ekverkis en Esperanto, gajnante premiojn en la poezia branĉo de la Belartaj Konkursoj de UEA en la jaroj 1954-1956. Per la publikigo de la furora verko *Ĉu vi kuiras ĉine?* (1976; 2-a eld. 1996) komenciĝis por li fekunda verkoperiodo kun la pseŭdonimo Johan VALANO, dum kiu aperis la poemaro *Malmalice* (1977; 2-a eld. 2001), kvar pliaj krimromanoj en la Ĉu-serio, la krimrakontaro *Ĉu rakonti novele?* (1986) kaj la sciencfikcia romano *Tien* (1997). Al la populareco de lia prozo kontribuis la vigla rakontado kaj la facila sed esprimforta lingvaĵo. PIRON estis granda porparolanto de lingvo, kiu evitas novismojn kaj klopodas efike eluzi proprajn eblojn de la Esperanta vortprovizo. Siajn principojn li klarigis profunde kaj polemike, interalie per psikologiaj eltrovoj, en la libro *La bona lingvo* (1989; 2-a eld. 1997) kaj li aplikis ilin tute precipe en facillingvaj rakontoj por *Kontakto* en la 90-aj jaroj kaj en didaktike verkitaj romanetoj por komencantoj. Eksterordinare furora fariĝis la krimromaneto *Gerda malaperis* (1983), multfoje represita kaj vendita en miloj da ekzempleroj. La kantokasedo *Frandu piron* (1982) atestas pri lia spriteco kaj multflankeco.

Claude PIRON famiĝis ankaŭ kiel unu el la plej elstaraj kaj vervaj pledantoj por Esperanto kiel solvo de la lingva problemoj en la internacia komunikado. Krom en Esperanto-aranĝoj, i.a. dufoje en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, li faris sennombrajn prelegojn antaŭ ne-esperantista publiko, i.a. en seminario ĉe Unesko (1986) kaj dum studotago en la Eŭropa Parlamento (1993), kie li traktis la psikologian reziston al la pristudo de lingva komunikado. Li publikigis diverslingve multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado. Por la serio de Esperanto-dokumentoj li verkis plurajn kajerojn, i.a. *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* (1977) kaj *Psikologiaj reagoj al Esperanto* (1988). Lia ĉefverko ĉi-kampe estas la franclingva libro *Le défi des langues* (1994), psikanalizo de la internacia komunikado kaj priskribo de Esperanto kiel reale funkcia lingvo.

Universala Esperanto-Asocio aljuĝis al Claude PIRON du el siaj plej gravaj distingoj. En 1994 li ricevis la Premion Onisaburo Deguči pro sia kontribuo al la antaŭenigo de internacia amikeco per Esperanto. En 1998 li fariĝis Honora Membro de UEA.

—Bill HARRIS



(Responde al la demando: "Mi ne konas Esperanton, sed mi aŭdis, ke Esperanto estas lingvo senanima, sensenta, sennuanca. Ĉu tio estas vera?")

Kiam infano priĝemis sian suferon en Esperanto, kaj apud vi ricevis esperantlingve konsolon, kiam vi pene laboris kun grupo da amikoj kaj kunspertis en Esperanto la ĝojon kaj la zorgojn, kiam, adoleske, vi flustris pri sekso en Esperanto, kaj poste esprimis en ĝi vian amon, kiam rifuĝinto rakontis al vi en Esperanto la turmentojn, kiuj igis lin forfuĝi, kiam vi vidis spektantojn ĝislarme kortuŝitaj ĉe aŭdo de poemo Esperanta kaj ĉeestis tiulingvajn kverelojn, kiam en diskuto pri politik' aŭ religio vi diris en Esperanto viajn timojn kaj indignon, kaj kiam, helpite en Esperanto, vi tiulingve prikantis viajn dankemon kaj raviĝon pri la mirindeco de homa solidaro, neniam, neniam plu vi taksos Esperanton lingvo senanima, sensenta, sennuanca. Mi scias. Ĉion ĉi mi travivis.

—Claude PIRON

(el *Vojaĝo en Esperanto-lando*, de Boris KOLKER)

Filling a storehouse of words

Building up a vocabulary is a major part of mastering a language—quite possibly *the* major part in terms of time and effort expended. So it's worth trying to find the best and most efficient way to teach (and learn) new words, ideally so they'll be remembered weeks, months or years later.

Let's try an experiment. I'm going to pick a couple of relatively uncommon Esperanto words you might not know and ask you to keep them in mind: *boaco* (reindeer) and *luko* (skylight, porthole). If you already happen to know those words, pick a couple of others at random.

Sometimes a word is so similar to its English equivalent that learning is no effort (provided it really does mean the same thing as its equivalent and isn't a "false friend"). Other times there's a mnemonic trick you can use. Montagu Butler suggests a number of them in his classic *Step by Step in Esperanto* ("A bee! Lo!" for *abelo*, for example.) But for the most part we have to rely on plain old memory.

Okay: without looking back, how do you say "reindeer" and "skylight" in Esperanto? Odds are you were already at least starting to forget. (If you have, go ahead and refresh your memory.)

When we first hear a new word, we start to forget it very quickly. In the 1960s an American authority on language teaching named Paul PIMSLEUR published research on the subject. According to PIMSLEUR, we forget a new word in as little as 5 seconds. But if we're prompted to think of the word just as we're starting to forget it, our memory will hang onto it a little longer, for about 25 seconds. Another reminder at that point, and we'll remember for two

minutes. Yet another reminder, and it will stick in our minds for 10 minutes. The intervals before forgetting then grow rapidly longer: an hour, a day, five days, 25 days, four months, and two years.

(By the way, do you remember how to say "porthole" and "reindeer"?)

It's important to try to remember the word as opposed to just hearing or seeing it again. In fact, a paper published in the February 15 issue of *Science* describes results of a foreign language vocabulary experiment that found, "Repeated studying after learning had no effect on delayed recall, but repeated testing produced a large positive effect."

Perfect adherence to PIMSLEUR's intervals might be practical only in a recorded or computer-based course. But even in an informal class or a club meeting you can use the basic idea. Ask a lot of questions (which helps get everyone thinking and talking anyway) and try to make the answers involve new words just introduced, words that came up a few minutes before, and words from previous days. (Not necessarily all in the same answer, but kudos if you can manage that!)

Of course, too much of this is exhausting, so don't overdo it. After a few minutes of questions and answers you can resort to something less mentally taxing—perhaps listening to a story or short talk in easy Esperanto, watching a skit, discussing in English some feature of Esperanto grammar, or singing a song. If that lasts about 10 minutes, it's just about time again to ask a few vocabulary-related questions.

There's no reason to keep secret what you're doing, because students



D. GARY GRADY

is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgary@mindspring.com

can use the same approach on their own. When they run across a new word they should try to remember it after a few seconds, then again after half a minute, and so on.

There are ways to work this into a daily schedule even for people not taking a class. For example, read some Esperanto over breakfast (with a dictionary handy) and talk to yourself about it in the shower and again while getting dressed, trying to recall any new vocabulary you ran across. Find some time later in the day when you can repeat the process, preferably without provoking too many worried looks from co-workers. Think about what you read yesterday, a week ago, and a few months ago. This doesn't just help vocabulary, it helps memory in general.

(And do you remember how to say "porthole" and "reindeer" in Esperanto?)

References:

- BUTLER, Montagu C., *Step by Step in Esperanto*.
- KARPICKE, J.D. and ROEDIGER III, H.L. (2008) The Critical Importance of Retrieval for Learning, *Science*, 319, 966-968.
- PIMSLEUR, P. (1967). A memory schedule. *Modern Language Journal*, 51, 73-75.
- http://en.wikipedia.org/wiki/Pimsleur_language_learning_system
- <http://www.pimsleur-language.com/method.htm>

★

Bostono: Sciencistoj diskutas la lingvoproblemon



Steven BREWER

BOSTONO, la 15-an de februaro — Ĉe la 2008 jarkunveno de la Amerika Asocio por Antaŭenigo de la Scienco (AAAS), eklektika teamo de sciencistoj kunvenis por diskuti la malegalaĵojn, kiuj rezultas de la nuna

kristaliĝo de tergloba angla kiel la plej grava lingvo de scienco. La simpozion kunordigis E. James LIEBERMAN, psikiatro, kaj prelegis Elrich AMMON, germana profesoro de lingvoscienco, José Antonio VERGARA, doktoro de epidemiologio kaj publika sano, kaj Humphrey TONKIN, profesoro de la angla lingvo. Lenore GRENOBLE, profesoro de lingvistiko ĉe la Universitato de Ĉikago estis la diskutanto por la simpozio.

La prelegantoj grandskale konsentas, ke en la nuna lingvo-sistemo de scienco partoprenas tri grupoj: denaskaj parolantoj de la angla, kiuj ricevas grandajn bonojn pro tio, ke ili povas ekuzi la sumon de sciencaj konoj sen la neceso lerni fremdan lingvon; internacia elito, kiu havas la karajn rimedojn lerni la anglan por partopreni en la monda scio-ekonomio; kaj la vasta oceano da tiuj, kiuj restas izolitaj de la internacia scio de scienco—kaj unu de la aliaj—krom al tiu punkto, kiun la internacia elito elektas dividi kun ili.

Ulrich AMMON provizis superrigardon de la nuna sistemo de la tergloba angla lingvo en scienco, kiel ĝi efektiviĝis, kaj li diskutis mallonge kelkajn eblajn sekvojn kaj ŝanĝojn. Kvankam en la malfruaj 1800-a jaroj, la fortaj ŝtatoj favoris siajn proprajn lingvojn, post la unua mondmilito komenciĝis nedeflankigebla kresko de la

angla en scienco, kaj tio rapidiĝis post la dua mondmilito. Nuntempe, la plejmulto de sciencistoj devas ekkoni la anglan por atingi la jam-ekzistantan korpon de klera literaturo en la angla, kaj tiu sama sistemo rondforme devigas ilin eldoni la proprajn verkojn en la angla por ke la laboro estu vaste konata kaj estimata. Tiu sistemo neproporcie ŝarĝas ne-denaskajn parolantojn kaj rezulte ties laboro malvaloriĝas pro la malfacileco atingi denaskajn normojn en scienca verkado. AMMON levis serion da demandoj pri kiel scienco povas respondi al tiuj malegalecoj.

José Antonio VERGARA pritaksis la kontraston inter la diritaj celoj de sciencaj organizaĵoj fari la scion de scienco havebla al ĉiuj, kaj la aĉa stato de la nuna cirkonstanco, kiu lasas la vastan plejmulton da homoj nescianta la plejmulton de la sciencaj scioj. Per kelkaj ekzemploj li montris, kiel parolantoj de la plejmulto da lingvoj malavantaĝas per la nuna sistemo, kaj ke multaj kiuj rikoltas la nunajn avantaĝojn profitas pro historiaj hazardaĵoj de koloniismo. VERGARA proponas la atingon de la promeso, kion ofertas scienco por transformi vivojn sen konsidero pri denaska lingvo.

Humphrey TONKIN kuraĝigis la aŭskultantaron preterrigardu trosimplajn kialojn por la nuna stato kiel sekvo de la manko de politiko. Li instigis ilin antaŭenigu esplorprogramon por eltrovi: kiu riĉiĝas per la nuna sistemo, kiu havas malavantaĝojn, kaj kiel tio okazas. Li priskribis, kiel oni ofte priskribas, globalismon kiel senagantan kaŭzon de la supereco de la angla, kvazaŭ ĝi ne estas la sekvo de sistema politiko—eĉ se tio estas manko de politiko. Preter la neceso de plua esploro, Tonkin proponas ŝanĝon pri kiel oni preparolas la maljustecon de lingva diskriminacio kaj la malegalecoj kiuj sekvas.

Ĉiuj prelegantoj substrekis la rolon, kiun grandaj sciencistaj organizaĵoj kaj eldonejoj kiel AAAS povus ludi en la antaŭenigo de pli justa sistemo kiu certigus kaj egaligus la rajtojn de ĉiuj tri grupoj de koncernatoj. Estas fundamente ekkompreni la rilatojn inter la koncernatoj kaj kiel ili profitas—aŭ malprofitas—por atingi politikon aŭ sisteman aliron al la problemoj de tergloba uzado de la angla en scienco. La prelegantoj proponas, ke AAAS kaj similaj organizaĵoj starigu komitatojn por esplori la temon.

—Steven BREWER

Seatlo: Instruado kadre de monda lingvotago



Arlyn KERR

SEATLO, la 29-an de februaro — Por la 6-a jaro la Seatla Esperanto-Societo kondukis klasojn kadre de *World Languages Day* ĉe la Universitato de Vaŝintonio en Seatlo. La universitato organizas la eventon ĉiujare je la fino

de februaro por la altlernejaj studentoj en la ŝtato. Proksimume 1300 studentoj ĉeestis, kaj ĉiuj elektis kvar klasojn inter 150 elekteblaj (ekz. ĉinaj festivaloj, la lingvo de sakartvelo, la rolo de filozofio en la franca kulturo, lecionetoj pri diversaj lingvoj, ktp)

Vidu: http://www.outreach.washington.edu/k12/wld/2008_sessions.pdf



Arlyn KERR kaj Haruo ROS gvidis la sesiojn. Foto de Arlyn KERR.

Nia esperanto-grupo kondukis tri 50-minutajn sesiojn, en kiuj partoprenis entute 55 studentoj. Ni uzis la konsilon de Gary GRADY kaj Dennis KEEFE (vd. 2008/1); ni parolis iomete pri la historio de la lingvo kaj la kialoj por lerni ĝin, sed plejparte ni instruis gramatikon, emfazante kiel facile estas lerni verbojn, krei vortojn, prononci. Ni strebis—kaj sukcesis—partoprenigi la studentojn (“Ĉu iu povas diveni, kion signifas tio?” ktp). Ni donis al ili multajn foliojn: *Esperanto in Your Pocket*, *La Unuan Lecionon*, informon pri la somera kursaro en San Diego, liston de aspektoj de Esperanto kiuj faciligas la lernadon, liston pri kiel oni povas uzi Esperanton post la lernado, ktp.

Krom la klasoj, nia grupo havis budon en la ĉambro de la “Kultura Foiro” dum la tuta tago. Ankaŭ tie ni disdonis flugfoliojn, montris librojn, kaj respondis al demandoj. Kiel ĉiam la agado estis laciga, sed fruktodona.

—Arlyn KERR ★



De maldekstre: BREWER, VERGARA, LIEBERMAN. Foto de S. BREWER.

Banejo കുളിമുറി

M. MUKUNDAN (1942–) de la ŝtato de Keralo en Sud-Hindujo estas pioniro de modernismo en la literaturo malajala. Li verkis plurajn amatajn romanojn, la plej fama el kiuj estas *Sur la Bordo de la Rivero Majuri* (krom malajale havebla kaj angle kaj france), kaj ankaŭ rakontojn en influa stilo. Laboris li multajn jarojn en la franca ambasadejo ĉe Delhi kaj premiigis li per la franca *Chevalier des Arts et des Lettres* je 1998.



Puruŝottaman havas deziron. Diino de Korom, bonvolu doni la deziron de Puruŝottaman—

Grandulo de Guruvajur, bonvolu plenumigi lian deziron—

Ajappa Sinjoro, afable fruktigu la deziron de Puruŝottaman—

Li neniam deziras ion ajn, la kompatinda stultulo. Eĉ infantempe, li neniam deziris ion ajn. Komerlistoj de malproksimaj lokoj vendis fajfilojn, balonojn, pilkojn, kaj tiajn plu ĉe la Tira festivalo en Korom.

Puruŝottaman neniam petis ion ajn. "Panjo, akiru balonon por mi. Ruĝan balonon."

Li neniam petis.

"Paĉjo, akiru por mi pilkon."

Neniam.

"Panjo, fajfilon havigu."

Eĉ kiam li plenkreskis, Puruŝottaman neniam havis deziron.

Li ne deziris bukloŝtofan ĉemizon.

Li ne deziris horloĝon.

Ne deziris monon por filmoj.

Puruŝottaman estas homo, kiu neniam deziris ion ajn. Nu, nun ĉi tiu sama Puruŝottaman ja havas deziron—li deziras esti muŝo.

Diino de Korom, bonvolu ŝanĝi Puruŝottaman al muŝo.

Grandulo de Guruvajur, bonvolu fari lin muŝo.

Ajappa Sinjoro, bonvolu transformi Puruŝottaman en muŝon.

Plej Alta kaj Bonfarema Dio. Se vi afable plenumus la humilan peton de Puruŝottaman—

Puruŝottaman deziras esti muŝo.

Ĉiuj havas deziron. Jen iu deziras gajni la loterion. Jen alia belan edzinon deziras. Aliaj deziras infanojn. Iuj personoj sopiras trovi laboron.

Kaj la justa Sinjoro plenumas iliajn diversajn dezirojn. Se ne tiel, tra sia tuta vivo, kiel Madhavan la ĉevalĉaristo esperus havi tian bonŝancon?

Madhavan aĉetis la unu-rupian loterian bileton ĉe la valizbutiko de Abubakkar. Li

enfaldis ĝin en sian talion. Dum li piediris al sia domaĉeto, li preĝis, "Dio, gajnu la loterion al mi ĉi-foje!"

Ĉu la Plej Alta kaj Bonfarema Dio povas rifuzi plenumi la deziron de Madhavan? Aŭ ĉu permesas, ke la deziro de sola Madhavan plenumiĝos? Ankaŭ ĉevaldenta Bhaskaran faris deziron, "Mi deziras belan edzinon."

Ĝus kiam ekpensis Bhaskaran la deziron, Dio jam sendis al li belan edzinon. Belulinon kun plena hararo kaj perloj anstataŭ dentoj.

Gopalan Mastro deziris, "Se mi nur havus filon..."

Kiam lia edzino naskis idon, ĝi estis vira. Ĉu la Dio, kiu grace benis Madhavan, Bhaskaran, kaj Gopalan Mastro, malbenas Puruŝottaman?

Puruŝottaman havas deziron.

Puruŝottaman volas esti muŝo.

La deziro esti muŝo alvenis la menson de Puruŝottaman hieraŭ. Ĝuste hieraŭ. Tamen li suferis kvazaŭ pasis mil da jaroj. La fajro de lia deziro varmege kaj brilege ekkraketas.

"Ĉu Vasanta estas ĉi tie?"

Levante sian kapon el la ĵurnalo, Gopalan Mastro vidis tra siaj okulvitroj, "Puruŝottaman? Kio okazis, filo? Sunleviĝe estas tro frue por vizito."

Gopalan Mastro sin etendis sur la seĝo.

"Sidu. Kara! Lakŝmi! Rigardu, kiu nin vizitas."

El la interno, neniun respondo.

"Verŝajne ŝi estas ĉe la puto."

Mastro denove popolis sian seĝolandon. Puruŝottaman stariĝis kaj eniris la domon. Li vidis neniun tie. Li fiksas sian dotion.* Tiam, iom fajfante, li daŭre marŝis al la puto.

Lakŝmi-amma staris apud la puto brosante siajn dentojn.

"Kio okazas, mia filo?" ŝi afable diris.

"Ĉu Vasanta estas ĉi tie?"

"Ĉu banas ŝi."

Puruŝottaman nur tiam rimarkis, ke la banejo estis fermita. Li povis aŭdi la plonĝajn kaj plaŭdajn sonojn de la akvo

eltiratan—plonĝo kaj plaŭdo.

Vasanta banis sin.

Pro ia kialo Puruŝottaman ekmalŝanĝis. La rideto sur la vizaĝo, la konstanta rideto, subite malaperis.

Lakŝmi-amma daŭre parolis kaj samtempe brosis la dentojn.

Puruŝottaman ne komprenis tion, kion ŝi diris, nek aŭdis ŝin ridantan.

Li simple staris tie fiksigardante la fermitan pordon. La nura sono, kiun li aŭdis, estis la sonoj de la akvo—plonĝo kaj plaŭdo.

La sono de la akvo haltis. La pordo malfermiĝis.

Malligita hararo. Malsekaj, ruĝaj braceletoj ĉe la pojnoj. Blankaj gutoj sur la kolo kaj vangoj.

Rideto floris tra la malsekeco!

"Puruŝ...?"

"Li atendis vin," raportis Lakŝmi-amma.

"Mi tuj revenos, okej?"

Vasanta iris internen kun sia malseka bantuko kaj sapingo.

Tiam estis la momento, kiam li ekvidis ĝin: en la banejo ĵus plenigita per la aromo de sapo kaj oleo, cirkle flugis muŝo.

Muŝo, kiu povas vidi ĉion.

Ekangoriĝis Puruŝottaman, pro envio al la muŝo.

Kvazaŭ tamburego batis lia koro. Liaj kruroj tremis. Lia vizaĝo paliĝis kvazaŭ papero.

Kia feliĉa muŝo! Kia tre fortuna muŝo!

Kial Puruŝottaman estis naskita homo? Forlasu esti naskita reĝo aŭ imperiestro—Puruŝottaman volas esti naskita muŝo.

En la banejo plena je la odoroj de sapo kaj medikamenta oleo, rampanta sur la muro, spektanta Vasanta-n....

O Dio, faru min muŝo.

Bhagavati, Ajappa, Guruvajurappa, Matappu-muttappa, aŭskultu mian preĝon. Faru min muŝo. Mi deziras nenion alian ĉi-vive. Mi petos nenion alian.

Bonvolu faru min muŝo.

Faru min muŝo.

Ĉu Dio povas rifuzi?

Kreis la Plej Alta kaj Bonfarema Dio specifajn diojn celante plenumi homajn dezirojn. Iu dio naskiĝis specife por gajni al Madhavan la ĉevalĉaristo la loterion, kaj havigi al ĉevaldenta Bhaskaran belegan edzinon. Naskiĝis alia dio specife por doni al Gopalan Mastro filon.

Kaj Dio devas krei dion specife por plenumi la deziron de Puruŝottaman. Se tiu dio ne povus plenumi ĝin, Dio denove kreus sin. Li rekreus sin al alia dio kapabla plenumi la deziron de Puruŝottaman. Alia dio pli forta ol la unua.

Puruŝottaman preĝis. Li preĝis nokte kaj tage. Bonvolu fari min muŝo. Ŝanĝu min en muŝon.

Li petis la arbojn kaj arbidojn, "Karaj arboj, bonvolu fari min muŝo."

Li petegis al la korvoj, "Karaj korvoj, bonvolu fari min muŝo."

Petis li la bestojn de la tero, la birdojn, kaj la serpentojn, "Faru min muŝo."

La arboj kaj arbidoj ekkriis, "O Sinjoro, faru Puruŝottaman muŝo."

La korvoj flugis alte sur la ĉielo kun

preĝoj en iliaj bekoj, "Plej Alta kaj Bonfarema Dio, plenumu la deziron de Puruŝottaman."

"Bonvolu fari lin muŝo," hurlis la bestoj.

"Faru lin muŝo," kantis la birdoj al Dio.

"Faru lin muŝo," siblis la serpentoj kaj zumis la insektoj.

Dio malfermis la okulojn kaj ridetis.

Kun maldikaj, fibraj kruroj alfiksitaj al lia stomako, per etaj flugiletoj, Puruŝottaman flugis al la domo de Vasanta.

Laŭ kutimo, Gopalan Mastro sidis sur sia komfortseĝo legante ĵurnalon. Li ne vidis Puruŝottaman preterflugantan fajfe.

Puruŝottaman eliris la domon tra la malantaŭa pordo kaj flugis al la banejo.

Li plantis sin sur la muro. De tie, li povis vidi ĉion. Ĉion.

Kun batanta koro, okuloj malfermegaj, li atendis la eniron de Vasanta. Sekundoj, sekundoj kiel eonoj. Aŭ eonoj kiel sekundoj, kiuj splitiĝis kaj ekfalas suben en la banejo.

Paŝoj de iu. Ĉu Vasanta? O Sinjoro, estu Vasanta. Mi ne povas suferatendi pli

longe... mi ne povas....

Mi mortos, se mi ne....

Vasanta eniris, kun sapingo kaj bantuko en la mano. La vitraj braceletoj cirkaŭ ŝiaj pojnjoj sonoris dum ŝi malligis la hararon.

Ŝi fermis kaj ŝlosis la pordon.

Ŝutis ŝi la medikamentan oleon sur la manojn kaj frotis ĝin sur la hararon. Dika hararo, nigra kiel okulŝminko, falanta suben ĝis ŝia talio.


Akompanate de la muziko de la braceletoj, ŝi malfermis la butonojn de sia bluzo....

Puruŝottaman vidis nenion. Aŭdis nenion. Li ekfrenezis.

Puruŝottaman ne vidis la doman lacerton rampi kviete al li el la kontraŭa murangulo.

Kaj li ne sciis, ke estis la lacerto, kiu lin voris.

* *Dotio*: tradicia vesto por viroj en Hindujo.

Elmalajaligis Donald R. DAVIS, Jr. kun danko al la redaktoro pro kelkaj tradukproponoj. 

Ŝercu en ĉiu sezono

La japana *senrjuo* estas mallonga parolstila poemo farita el 17 silaboj, sen la sezonvorto de la *hajko*. Ĝin karakterizas simpleco, humuro, komikeco kaj sprito. Ĝi populariĝis dum la erao Edo (1603~1867), kaj ricevis sian nomon de la fama poeto KARAI Senryu.

Komenciĝis en 1987 la *Daiichi Seimei Sarariiman Senryu Konkuru* (Daiichi Seimei-a Salajrula Senrjua Konkurso) fare de la asekura kompanio Daiichi Seimei. Reflektante la socian staton de la salajrulo, la temo plejparte prezentas lian amaran vivon kaj edziĝon kun humoro kaj ironio.

Sekvas poemaro tirita el poemoj varbitaj de la konkurso. Ĉiun poemon sekvas la kromnomo de la aŭtoro.

LA EDZINO

1. 痩せるツボ 脂肪が邪魔し 探せない

Neeblas trovi
prempunkton por dieti
por ŝia grasec'.

— *Yukinokonohitorigoto*

2. 「買っていい？」 聞く時既に 買ってある

Kiam ŝi petas
la permeson aĉeti
jam ŝi aĉetis.

— *eleki neko*

3. タバコより 体に悪い 妻のグチ

Ol la fumado
pli difektas la sanon
ŝia murmuro.

— *shooshinteishu*

4. まだ寝てる 帰ってくれば もう寝てる

Salutas el lito
Min kara edzino,
Sed sen invito.

— *tookuno wagaya*

5. プロポーズ あの日にかえって ことわりたい

Edziĝproponon,
revivanta la tagon,
Ĉu mi referus?

— *kyoosaiotoko*



Esperantigita kun permeso de Daiichi Seimei, el la japana fare de FUJII Yumiko kaj George BAKER.



Esperanto-USA Investment Funds

As you know, Esperanto League for North America (ELNA) now operates under the name dba (doing business as) "Esperanto-USA". Esperanto-USA has also changed its fiscal year. In the past, the fiscal year was May 1 until the following April 30. Now we are using the calendar year beginning January 1 and ending December 31. So for this one year, there is a short year: May 1 – December 31, 2007.

Below is the "Statement of Fund Activity" for the short year May 1– December 31, 2007.

This statement basically shows the investments we have with a broker for all the Esperanto-USA funds. As of December 31 the total balance in these funds (investments) was \$359,373. You will note that there are three categories of funds: Unrestricted, (Temporarily) Restricted, and Interest-Only (Permanently Restricted).

Let's begin with the Unrestricted Funds. These are funds established by the board of directors. At any time, the current board may decide to discontinue one of these funds. That is, basically, the definition of an unrestricted fund.

The general fund consists of those funds not actually in any of the other funds. If someone makes a contribution to the

General Fund, a "Friend of Esperanto" donation, or without stipulating where the money is to be placed, it goes into the General Fund. So during this short year, a total of \$4,492 was donated either directly to this Fund or simply to Esperanto-USA with no indication that the money should go to any particular fund. In addition, based on a formula of the interest/dividend income earned during the year (a net of \$10,121 for the short year) a total of \$4,797 was added to the General Fund. The transfers to and from this fund came from several of the other Unrestricted Funds. In a later article, those transfers will be explained.

The Expenses of \$35,493 for the General Fund basically reflect a balancing of all the other activity in all the funds. Since donations were made but not necessarily actually sent to the investments, the different funds need to be increased, but there is no direct input of cash. That is shown by a reduction of the General Fund and an increase to the amount available for those other funds. That way you can be sure that when you make a donation to a specific fund, that money will indeed be available for that fund.

Occasionally, when the Central Office (CO) has some extra cash available, it will transfer some funds into this Investment



ANNA BENNETT

is Treasurer of Esperanto-USA. She lives with her husband Larry in Boise, Idaho.

annabennett@yahoo.com

Fund. Likewise, if the CO runs short on cash, it can transfer some money out of the investments. During this past short year, no such transfers were made to or from the CO.

The next article will explain some of the other Unrestricted Funds: how they were established, what are their purposes, and how they can be used, including any restrictions to their use.

Meanwhile, if you want to help Esperanto-USA in the work it does to promote Esperanto, a General Fund donation is very helpful! In this past year's annual budget, approximately 7% of the total income was projected to go directly to this fund. Unfortunately, in actuality only about 5% of the total income came from such donations. To continue the operations of the CO, which includes the book service, Esperanto-USA needs your help. If you can make any donation (large or small) in addition to your dues, it will greatly help in our work to promote Esperanto and help people learn it. ★

	Beginning Balance	Donations Received	Expenses	Transfers	Balance Before Inv.Inc.	Investment Income	Adjusted Ending Balance
Unrestricted Funds							
* General	\$ 70,910.46	\$ 4,492.10	\$ 35,492.66	\$ 22,173.28	\$ 62,083.18	\$ 4,797.24	\$ 66,880.42
Gibson Endowment	24,814.27	80.00	0.00	0.00	24,894.27	0.00	24,894.27
H.E. Reed Education	0.00	21,856.99	0.00	(21,856.99)	0.00	0.00	0.00
* Life Membership	29,261.28	2,400.00	0.00	(2,216.29)	29,444.99	0.00	29,444.99
Glenny	1,881.58	65.00	0.00	0.00	1,946.58	56.12	2,002.70
* Publishing	12,144.96	0.00	45.00	1,900.00	13,999.96	368.49	14,368.45
Total Unrestricted	\$ 139,012.55	\$ 28,894.09	\$ 35,537.66	\$ (0.00)	\$ 132,368.98	\$ 5,221.85	\$ 137,590.83
Restricted Funds							
* NASKE	\$ 4,877.27	\$ 325.00	\$ 0.00		\$ 5,202.27	\$ 261.37	\$ 5,463.64
Educational Video	14,462.58	7,334.94	1,508.76		20,288.76	598.37	20,887.13
Thompson	12,885.94	0.00	0.00		12,885.94	373.43	13,259.37
Schulze Education	30,290.54		0.00		30,290.54	2,528.51	32,819.05
CATW Education	642.18		192.61		449.57	169.38	618.95
Goldman Education	7,196.23		0.00		7,196.23	702.84	7,899.07
Wolff Publicity-Information	2,023.72		0.00		2,023.72	240.01	2,263.73
Klara Zamenhof	860.77	45.00	0.00		905.77	25.37	931.14
Total Temp. Restr.	\$ 73,239.23	\$ 7,704.94	\$ 1,701.37	\$ 0.00	\$ 79,242.80	\$ 4,899.28	\$ 84,142.08
Interest-Only (Permanently Restricted) Funds							
* Massey	\$ 47,807.34	\$ 0.00			\$ 47,807.34		\$ 47,807.34
Thomas A Goldman	17,057.00	0.00			17,057.00		17,057.00
* Ellen Lewis	4,028.01	25.00			4,053.01		4,053.01
Catherine & William Schulze	56,564.83	443.00			57,007.83		57,007.83
Wolff Endowment	6,185.72	97.00			6,282.72		6,282.72
Children Around the World	5,357.52	75.00			5,432.52		5,432.52
Total Perm. Restr.	\$ 137,000.42	\$ 640.00	\$ 0.00	\$ 0.00	\$ 137,640.42	\$ 0.00	\$ 137,640.42
Total of all Funds	\$ 349,252.20	\$ 37,239.03	\$ 37,239.03	\$ (0.00)	\$ 349,252.20	\$ 10,121.13	\$ 359,373.33
NOTES:							
General Fund Donations reflect contributions to General Fund and Friends of Esperanto Dues;							
Expenses reflect adjustment to balance receipts and expenditures							
Life Membership Transfers reflect annual amortization of Life Memberships at 7% to Annual Dues							
Publishing Fund Transfers reflect annual allocation of 50% of net profits from							
ELNA-published books							
Income generated in Gibson Endowment, Life Membership, and Massey Funds goes to General Fund							
Income generated in Ellen Lewis Fund goes to NASKE Fund							
Net Investment Income Includes:							
Interest/Dividend Income						\$	12,129.79
Gains(Losses) Realized							663.95
Unrealized Gains (Losses)							(2,572.61)
Services Charges Paid							(100.00)
Net Investment Income						\$	10,121.13

Krucenigmo-konkurso: solvu kaj (eble) premiigu!

Horizontale

- 1 "Ho, mia ____!"
- 4 Sukcesa forkur'
- 9 Bukleta teksajer'
- 12 Papava narkotik'
- 13 Kunludantaro
- 14 "____ for en bona horo"
- 15 Unua parto de la proverbo
- 18 "En ĉiu ____ loĝiĝo estas parto de ruiniĝo."
- 19 Kulpig'
- 20 "En sia korto ĉiu ____ estas forta."
- 22 La nom' de Dio por la Atestantoj
- 26 Glit-tabulo
- 29 Kvalito, aŭ Umberto kiu verkis la libron "La

- serĉado de la perfekta lingvo"
- 32 "Kia la homo, tia la ____"
- 33 ____skatolo, por konservi preparitan manĝaĵon
- 34 Ripari veston, ekz.
- 35 Intermontej'
- 36 Hejmland' de teheranano
- 38 "____ domon novan kaj amikon malnovan."
- 39 Ĉen', sinsekv', vic'
- 40 Kapvest' de brita juĝisto
- 42 "Lasu (9 vert.) paroli ____!"
- 44 Laŭregula nutromanier'

- 47 Imaga, sed eble ne atingebla perfektec'
- 51 Dua parto de la proverbo
- 55 Denove, aŭ dorsire (vidu 17 vertikale)
- 56 Difinita spacopart'
- 58 Ω (mezurunuo de elektra rezistanco)
- 59 Aŭdeblaĵoj
- 60 "Tuso kaj ____ ne estas kaŝeblaj."

Vertikale

- 1 "Salutnomon" ties posedant' havas
- 2 Muzika teatraĵ'
- 3 "____ estas tiu, kiu ŝuldas al neniu."
- 4 Atmosfero, tono
- 5 Besta gras'
- 6 Kun 7 vertikale, salut' al ŝatata korespondanto
- 7 (vidu 6 vertikale)
- 8 Land' kie okazos la 94-a Universala Kongreso
- 9 (vidu 42 horiz.)
- 10 "Vivon travivi estas ____ malfacila."
- 11 Rilata al ino
- 16 Likva kolorigilo
- 17 "____ al (56 horiz.) riproĉas malsaĝon."
- 21 "Li mensogas tiel, ____ muroj krakas."
- 23 Ekkrio pro malfeliĉ'
- 24 Marbest', aŭ propra nomo de usona generalo Bradley en la dua mondmilito

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11	
12				13						14			
15				16						17			
18						19							
				20		21		22		23	24	25	
26	27	28			29	30	31		32				
33					34					35			
36				37		38				39			
40					41			42	43				
				44		45	46		47		48	49	50
51	52	53					54						
55					56					57			
58					59					60			

Solvo de la krucenigmo en 2008/1:

1	R	A	2	P	I	3	D	I	4	G	A	5	S
	U			L			O			A			A
6	I	7	N	O			T		8	B	9	A	T
10	N	A	R	K	O	12	T	I	K	A			
			T		E			I			L		
13	K	U	14	N	P	15	R	E	16	M	A	17	S
18	A	R	E				E		19	A	M	O	
			R		E		E			R			L
20	B	U	L	O	N	J	O	Ĉ	E				

Gratulon al **Tim WESTOVER** (kiu gajnis la lotumadon!) kaj dankon al ĉiuj niaj ludantoj: A. VICTOR, B. HARMON, G. BAKER, R. WILLIAMS, D. RUTAN, S. LAWTON, R. ANDERSON-CONNOLLY, R. THIBAUT, D. EVANS, E. LIEBERMAN, K. GOLDBERGO

- 25 Deziri, intenci
- 26 Foliet' por notoj
- 27 "Kio kostas malmulte, kostas plej ____."
- 28 Posteuloj
- 30 Fuŝaj' komputil-programa
- 31 Task', rol', ofic'
- 37 "Kiu rabi eliras, ofte ____ revenas."
- 39 Aŭstralia revuo *Esperanto sub la ____ Kruco*
- 41 Tuŝetas milde
- 43 Kuracistoj sen ____ grupo nobelpremiita en 1999
- 45 Eksfraŭlo
- 46 "Kie dento doloras, ____ iras la lango."
- 48 "Estas tubero ____ afero."
- 49 Materier'
- 50 "Kurbigu hoko laŭ postuloj de l' ____."
- 51 Konsistiga parto
- 52 "Kia la ____o, tia la rikolto."
- 53 Ĉaj, ĉeĥe
- 54 Grupmembro

Jen la dua enigmo en nia krucvort-konkurso. Ĉi-foje ĝi estas iom pli malfacila ol lastfoje, do inter la solvontoj ni lotumos **du** premiojn po \$10 da rabato ĉe la retbutiko/libroservo de E-USA. Rajtas partopreni ĉiuj ricevantoj de la paperforma bulteno. **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 10-a de majo.** Bonan sukceson!

Volas korespondi

Agbagnaglo Koffi Benjamin, Togolando.
<akoffibenjamin@yahoo.fr>

15-jaraĝa lernanto, kristano. Mi amas paroli esperanton kaj mi havis la diplomon de la ekzameno A1. Mi amas ludi futbalon, serĉas korespondamikojn.

Agbehou Koffi, Lomeo, Togolando.
<spapas021@yahoo.fr> 19-jaraĝa lernanto, komencanto sed jam ricevis la diplomon A. Mi amas futbalon, fari

muzikon. Mi estas membro de la klubo de Zamenhof. Vi povas helpi min plibonigi la nivelon de la lingvo kaj ricevi novaĵojn de via lando.

Evandro Francisco DE QUEIROZ, Brazilo.
<efranciscocodequeiroz@yahoo.com.br> I'm a recently retired policeman and self-taught student of English. I'm protestant, married and father of two daughters. Looking for correspondents to help me improve my skills in Esperanto.

Mary CLAY, 57 Rogers Rd, Dagenham, ESSEX RM10 8JX, England. Mi estas 62-jaraĝa virino, aktiva, volas korespondi kun plumamiko/plumamikino pri io ajn.

Phineas MAFURU, Tanzanio.
<pmafuru@yahoo.com> University student studying Community Development. I am very interested in social science education in my country and the world. Seeking Esperanto-speaking friends.

Partoprenu en niaj Esperanto-programoj ĉi-somere!



Kongreso de Esperanto-USA 11 – 14 julio Tut-Amerika Kongreso (TAKE) 11 – 18 julio Montrealo, Kanado

Ĉi-jare nia landa kongreso estos parto de TAKE. La estraro kunvenos tuttage la 11-an antaŭ la interkona vespero. Kiel kutime, la estrar-kunveno estos malferma al ĉiuj niaj membroj, sed oficiale la kongreso de E-USA komencos vespere 11-an. Ĝi fermos la 14-an mezutage, sed TAKE daŭros ĝis la 18-a. Ni rajtas aliĝi al TAKE por 4 tagoj kaj partopreni ĉion dum tiuj kvar tagoj—aŭ dum ok tagoj partopreni la tutan programon, kiu post la 14-a plejparte frontos la temon “Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj.”

La kanadanoj ofertas antaŭ- kaj post-kongresajn vizitojn en la belega regiono de Montrealo. Petu aliĝilon de Esperanto Vojaĝ-Servo, aŭ vidu la hejmpaĝon de TAKE:

<http://www.take7.ca>

Usono ne povos gastigi TAKE-n ĉar nia registaro donos ege malmultajn vizitojn al sud-amerikanoj. Pro tio, nia estraro decidis

helpi al la kanadanoj gastigi la kongreson per oficiala partoprenado en TAKE dum almenaŭ 4 tagoj. Se vi povos partopreni la tuton, nepre aliĝu por ĉiuj ok tagoj. Poste, bonŝanculoj povos rekte flugi al Amsterdamo por partopreni la jubilean kongreson de Esperanto.

Nord-Amerika Somera Kursaro La plej bona en la mondo! 30 junio – 18 julio

NASK okazos tuj antaŭ la UK ĉe University of California, San Diego—detala informo kaj stipendia helpo haveblas. Kontaktu <eddyellen@aol.com> aŭ vidu:

<http://esperanto.org/nask>

93-a Universala Kongreso (La 100-jara jubileo de la fondiĝo de Universala Esperanto Asocio) Rotterdamo, Nederlando 19 – 26 julio

Lastatempe Rotterdamo fariĝis ne nur tre sukcesa komerca havenurbo, sed ankaŭ arkitekture avangarda kaj kulturoplena. La Uniĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2008

Internacia Jaro de Lingvoj. Tiu deklaro inspiris la elekton de la kongresa temo: “Lingvoj: trezoro de la homaro.”

Rotterdamo estas sufiĉe multekosta urbo—speciale ĉar la valoro de la usona dolaro tiel multe falis kontraŭ la valoro de la eŭro. Lastatempe unu \$US valoras nur 0.68 eŭrojn. La UK-programo certe estos bunta pro la jubileo de UEA—kaj la eblaj eksursoj ankaŭ interesaj—speciale multaj kelkhoraj aŭ unu tagaj krozoj sur la rivero Maas tra la plej granda, moderna haveno en Eŭropo ĝis la “Delta Works” kaj al la spektaklaj ventumiloj de Kinderdijk. Rotterdamo estas konata kiel “Verda Urbo,” ne nur pro la fakto ke ĝi estas la sidejo de la Esperanto-movado. Esperanto Vojaĝ-Servo aranĝos rektajn flugojn al Amsterdamo kaj trajn-konekton en Amsterdamo al Rotterdamo por tiuj irontaj al la UK. Helpo en viaj aranĝoj haveblas de Esperanto Vojaĝ-Servo. ★



Esperanto Vojaĝ-Servo

1824 Euclid Avenue
Berkeley CA 94709

Tel.: 510-531-8393

Fax.: 510-531-0152

<LusiHarmon@AOL.com>